

Annette von Droste-Hülshoff,
 Lastaj vortoj

tradukita de Joseph Ferdinand Berger

Amatoj, kiam min forlasis
 spirit', ne ploru do pro mi!
 Por paca ekzistad' min kaŝis
 en brila tag' la bona Di'.

Ne estas plu ĉagreno tera.
 Eternas via bild' ĉe mi.
 Mi petos pri balzamo vera
 por vundoj kaj dolor' de vi.

Se svingas Pac' en nokta ombro
 Seraflugilojn super Ter',
 ne pensu plu pri mia tombo!
 Salutas mi el stela sfer'.

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (*1894-10-07 – †1976-03-28) en 1958.*

Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)

Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperanto-revuo "Norda Prismo", n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la ttt-ejon "http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/np/np5802/lastaj.html" de s-ro Donald Harlow el Pinole CA-94564, Kalifornio. Malgraŭ la supra indiko la poemo ne estas verkita de la poetino mem, sed - laŭ pli nova scienca ekkono - de ŝia nevino Elisabeth, post la morto de Annette von Droste-Hülshoff. Oni ĝis nun nur atribuis la poemon al Annette von Droste-Hülshoff.

Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon http://wapedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2. .